

Ne estu koko, venu al KKPS!

Ĉu vi rajtas nomi vin Esperantisto, se vi neniam ĉeestis la Klaĉ-Kunvenon Post-Someran? Evidu tiun filozofian demandon per tuj aliĝi al la mojosa aŭtuna kunveno



de la Nederlanda Esperanto-Junularo. KKPS en 2018 okazos de la 2-a ĝis la 4-a de novembro en Bekerhof en Hunsel, preskaŭ ĉe la belga landlimo kaj bone atingebla per publika transporto. La programo konsistos el halovena balo, koncerto, ekskurso, kursoj kaj prelegoj. La grupdomo havas luksajn sofojn, trinkejon, sportkampojn kaj fajroplacon. La vilaĝo Hunsel havas neniun interesaĵon.


La reta aliĝilo malfermiĝos je sabato la 17-a de marto 2018 je 16:00 laŭ Hunsel-horo en kkps.esperanto-jongeren.nl

Jen la kotizoj:

	Benelukso	Okc. Eŭropo	Resto
35+	€70	€65	€60
20-34	€55	€50	€45
4-19	€45	€40	€35
3-	€10		

Membroj de TEJO aŭ NEJ pagas €10 malpli, aliĝoj post julio pagos €5 pli.

Minimuma antaŭpaĝo: €15. Malmultekostaj trajngrupbiletoj haveblas.



Pos-Amiko

Printempo 2018, Numero 24

Pensu pri aliaj homoj, pludonu la gazeton!

INDEKSO:

1. Evildea aliĝas al redakcio
1. Badajoz preparas sin kontraŭ neĝo
2. UEA-retpaĝo finfine preta post kvin jaroj
2. TEJO-estraro elektas Slovakujon
2. Nova armita faka sekcio de TEJO
3. NEJ-Novaĵoj
3. Horoskopo
4. EVENTOJ

KOLOFONO

Pos-Amiko estas eldonaĵo de

NEJ kaj aperas kvarfoje jare.

Redaktoro: Koko Poso

kkps.klackunveno@gmail.com

http://kkps.esperanto-

jongeren.nl/Pos-Amiko

Evildea aliĝas al redakcio

La konata jutubisto Richard Delamore, pli bone konata sub sia kromnomo Evildea, en marto ŝokis la mondon per anonco, ke li ne plu faros filmetojn. Li bezonos dediĉi sian tempon al aliaj projektoj, inter ili Amikumu. Sed alia grava afero estas, ke li anonime aliĝos al la redakcio de la Pos-Amiko por kontribui sian unikan senton de humuro al la gazeto. La redakcio fieras havi lin en la teamo, eĉ se anonime!

Badajoz preparas sin kontraŭ neĝo

Antaŭ mallonge Hispanujo iĝis tute blanka por kelkaj tagoj. Grandaj partoj de la lando estis kovritaj de neĝo, malkutimaĵo en la mediteranea lando. Ĉu kaŭzita de klimatsanĝo, ĉu simple hazardo, la IJK-teamo estis ŝokita de la okazo. Nenomita fonto en la organiza teamo informas nin:

C.P.: “Ni bonŝanĉis, ke tio ĉi okazis en februaro kaj ne en aŭgusto. Imagu la ĥaoson, ni tute ne estas preparitaj por tio ĉi. Sed se tio denove okazus, ni povas esti preparitaj.”

Pos-Amiko: “Kiajn specifajn preparojn la IJK faras?”

C.P.: “Diversajn aferojn. Ni aĉetis salon, ŝovilojn kaj sledojn, kaj neĝoĉenojn por niaj aŭtoj. Krome ni metis varmigilojn en ĉiun ĉambron (kaj forprenis la malvarmigilojn) kaj ŝanĝis la mendon de IJK-ĉemizoj al IJK-puloveroj. Neniu neĝo aŭ glacio povos detrui nian hispanan IJK-on!”

UEA-retpaĝo finfine preta post kvin jaroj

Longe daŭris la laboro, sed antaŭ la somero la mondo vidos la novan UEA-retpaĝon. Kial tiom longe? Programisto A.R. klarigas la procezon: “Pro sekurecaj kialoj (aŭ eble ĉar la ofi-
cistoj ne scipovas malfermi pordon 22) mi ne havis rektan aliron al la servilo, sed devis
sendi ĉiun ŝanĝon per poŝto al Roterdamo. Post ricevo ili tuj aplikas la ŝanĝon kaj faras
ekranprinton por resendi poŝte. La laboro tiel daŭras iomete pli longe, sed feliĉe mi estas
pagata laŭ monato. Post la laboro pri retpaĝo mi ankoraŭ renovigu la voĉdonsistemon.
Normale tio prenis al mi unu monaton, ĉe UEA eble iomete pli longe.”

TEJO-estraro elektas Slovakujon

Akra kaj videbla estis la ĉi-jara batalo inter IJK-kandidatoj. Unu bona kaj unu bonega kan-
didato, unu kun belega afiŝo kaj unu kun reklamo en la Pos-Amiko. La plej granda gajnan-
to estis certe la neŭtrala publiko, kiu ricevis amason da bongustaĵoj slovakaj kaj neder-
landaj. Finfine tamen gajnis la slovaka teamo pro la brila unika slogano: “IJK en Slovakio!”

Nova armita faka sekcio de TEJO

En la pasintaj jardekoj kreiĝis diversaj novaj komisionoj kaj fakaj sekcioj de TEJO. Pri
interreto, pri biciklado, pri muziko aŭ pri trajnoj, por preskaŭ ĉiu ajn interesiĝo oni povas
trovi samideanojn en la junulara movado. Ĝis nun tamen mankis grupo por tiuj, kiuj volas
konversacii aŭ ekzerci pri malnovaj batalŝipoj, novaj maŝinpafiloj aŭ la plej bona maniero
por konkeri najbaran landon. Sub la nomo Amika Rondo pri Milito en Esperanto (ARMEo)
la iniciatantoj celas starigi fakan sekcion, kolekti materialojn kaj organizi ekskursojn tra
landlimoj. Estrarano de TEJO komentas:

“Ni ege bonvenigas tiun ĉi projekton. Kiel vi scias, lingvo estas dialekto kun armeo, do nia
nova faka sekcio certe helpas al ni gajni plian rekonon. Ni ankaŭ esperas, ke ĝi helpas por
pli facile ricevi subvenciojn aŭ varbi membrojn.”

ANONCO

Ni oficiale anoncas, ke en tiu ĉi Pos-Amiko ne estas oficiala anonco.

NEJ-Novaĵoj!

NEJ-tago sur glacio: „Ne zorgi!“

La nova jaro estas malfermita de NEJ per la unua NEJ-tago, sur glacio en Ede. Kvinope ni glitkuris kaj stultumis, kaj poste ni ankoraŭ esploris la centron de Ede. En la grupo estis tri jamaj, unu nova kaj unu estonta membro.



LA HOROSKOPO

Ŝafo: Ne forgesu paki dikan ŝalon por vojaĝo al Mediteraneo.

Taŭro: Vi mallernos vian gepatran lingvon por pli uzi Esperanton.

Ĝemeloj: Vi en ebria vespero kandidatigo kiel komitatano.

Kankro: Vi ne renkontos ĉarman fremdulon.

Leono: Vi malkovras, ke pli agrablas Pasko ol tasko.

Virgulino: Post fulmkurso vi ne plu estos.

Pesilo: Vi ankoraŭ ne lernis Esperanton kaj pro tio vi ne legas tiun ĉi frazon.

Skorpio: Vi pro malkontento starigos vian propran TEJO-n.

Kévin M.: TEJO ne protektos vin.

Sagitario: La suno leviĝos tridekfoje en aprilo.

Kaprikorno: La plej bona loko por kaŝi ovojn estas ne kunporti ilin.

Akvisto: Memoru, ĉio estas manĝebla, sed kelkaj aferoj nur unufoje.

Fiŝoj: Vi rezignos pri via laboro por fari piedan karavanon al KKPS.

Surprizaj gastoj dum ludotago

Dum la NEJ-ludotago en Den Bosch, sabaton la 24-an de februaro, ne nur NEJ-membroj vizitis la ludoklubejon. Unu belgo, unu polo kaj du eksmembroj alvenis por ludi kun ni. Pro tio la programo ne nur konsistis el ludado, sed ankaŭ estis mallonga prezento pri la agado de NEJ kaj babilado pri rakontoj el NEJ-historio.

Venontaj NEJ-tagoj

- 25-a de marto: ludotago, Ede
- aprilo: Roterdamo
- majo: Antverpeno?
- 24-a de junio: Parkpop, Den Haag

Nova statuto registrita

La dum KKPS akceptita nova statuto, kun pli alta aĝlimo kaj retaj membrokunsidoj, en aprilo (finfine) estos registrita ĉe notario.